

Numero: 236.
Januaro: 2012.

20-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefona: 82/ 410-664
Retadreso: espBELA@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Saluton nova jaro 2012



Devove forpasis jaro kaj ni staras ĉe la sojlo de la nova.

Kion ĝi portos al ni, ankoraŭ ni ne scias. Ni nur esperas, ankaŭ la jaro 2012 estos paca, sana kaj prospera.

Ni estas geesperantistoj kaj ni esperu. La espero estas granda trezoro. Kiu povas esperi kaj atendi, tiu atingas sian celon.

Mi kredas, nia lingvo fariĝos la dua gepatra lingvo de la homaro en iu tago. Vere ĝis tiam ankoraŭ ni devas lukti multe. Antaŭ ni estas ankoraŭ multe da bariloj, kiuj malfaciligas nian laboron.

Ni ne laciĝu kaj ni ne malgajiĝu, se ni renkontos malamikojn. Certe ili ekprovos primoki nin, ĉar ni disvastigas la Zamenhofan lingvon. Ne timu de ili, eĉ ne kredu al ili, ĉar ili deziras misgvidi nin.

Esperanto estas utila lingvo. Mi scias, ĝi tre plifaciligas la komunikadon inter diverslingvaj homoj.

Kiel belege estus la mondo, se ĉiu uzus la Internacian Lingvon en la ĉiutaga vivo. Ne estus strangaĵo, se oni lernas Esperanton.

Ankoraŭ estas en la komenco de la nova jaro 2012. Ankoraŭ antaŭ ni estas dekdu monatoj kun multaj sukcesoj kaj fiaskoj.

En neniuj tagoj forgesu popularigi Esperanton, kaj ni montru al niaj geamikoj kaj gekonatuloj, nia lingvo estas uzebla sur ĉiu tereno de la vivo!

Ni, geesperantistoj scias, per ĉi lingvo ni povas kompreni nin, kaj helpe de Esperanto naskiĝis sinceraj amikecoj, eĉ amoj dum jardekoj.

Esperanto ne estas nur bona ludilo.

Tion ni scias, sed nia tasko montri al la dubantoj de la Internacia Lingvo, kiom bone oni povus uzi en la mondo, se la homaro unuanime akceptus ĝin.

Esperable ankaŭ en la nova jaro naskiĝos multaj rezultoj oni amase komencos lerni ĝin.

Mi deziras al ĉiuj legantoj de Vesperto prosperan, sanan, gajan novan jaron por 2012!

Mi scias kaj sentas, nia laboro ne estos vana, ĉar antaŭ Esperanto estas brila estonto. Ĝi povos solvi la lingvajn miskomprenojn kaj kompreni diverslingvajn parolantojn.

De ni dependas, ĉu Esperanto fariĝos la dua gepatra lingvo de la homaro aŭ ne.

-Redaktanto-

Kara lingvolernanto

(Publika letero)

Certe nun vi miras, kial mi skribas al Vi leteron, kiam apenaŭ Vi scias ankoraŭ Esperanton. Vi nur balbutas kaj serĉas la vortojn por esprimi Vin.

Ne timu malfermi Vian buŝon! Ankaŭ mi estis komencanto. Ankaŭ min „maljunaj” geesperantistoj instigis.

Ne forgesiĝu, Esperanto estas ĉies lingvo, kaj ĝenerale ĉiu lernas ĉi tiun lingvon, kaj nur malmultaj homoj povas diri pri si mem, mi suĉis la lingvoscion kun patrinolakto.

Kiam mi komencis lerni Esperanton, unue ankaŭ mi timis ekparoli en tiu ĉi lingvo. Baldaŭ mi spertis la helpon de geesperantistoj. Neniam mi estis primokita, eĉ ili ĉiam helpis al mi. Post iom da tempo mi jam ne timis. Mi kuraĝe malfermis mian buŝon kaj mi vidis, kiom bonege eblas komuniki per la zamenhofa lingvo.

Ankaŭ Vi spertos tion, kaj mi scias, Vin ĉarmos ĝia facileco, logikeco kaj belsoneco.

Se Vin infektas tiu ĉi sento, tiam el „la malsano” Vi ne povos liberiĝi. Ĝis la lasta spiro de Via vivo Vi restos esperantisto, kiu ĉiunokte kaj ĉiutage revadas pri belega estonto, kiam la homaro havos komunan lingvon, kaj ĉiu komprenas unu la alian, kiel en granda familio. Malaperos la lingvaj bariloj, kiuj ĝis nun ne helpas la ĉiutagan komunikadon.

Tra la tuta mondo nin malhelpas la lingvaj miskomprenoj. Dum diversaj internaciaj konferencoj, kongresoj la tradukadoj, interpretadoj ege multekostaj.

Se Esperanto estus disvastiĝinta, oni povus ŝpari multe da mono, kaj krome la mondo estus pli simpla.

Nun Vi lernas Esperanton por ricevi Vian diplomon. Se jam ĝi estos en Via mano, pripensu, efektive kial Vi ellernis tiun ĉi lingvon.

Antaŭ Vi estas du vojoj. Vi povas forĵeti la dokumenton pri la lingvoekzameno, aŭ Vi uzos ĝin ankaŭ en la praktiko.

Mi proponas al Vi, almenaŭ unufoje partopreni iun Esperanto-aranĝon! Mi garantias al Vi, Vi ne trompiĝos, ĉar la travivaĵo estos eksterordinara.

Do, kara amiko, Vi nun staras ĉe la sojlo de bela mondo, kaj nur de Vi dependas, ĉu Vi enpaŝos en ĝin.

Amike, Ŝaŝa



Silento

La vagonaro kuregis inter montoj kaj sur floraj kampoj. En la kupeo li estis sola.

Antaŭ la fenestro la pejzaĝo intermitis. Li enue rigardis la forkurintajn domojn, arbojn kaj riverojn.

Komence ankoraŭ li rigardis ĉion, kio estis trans la fenestro de la vagonaro.

Li endormiĝis. Lia patrino avertis:

--Fileto mia, Peĉjo, neniam endormiĝu en la vagonaro, ĉar venas malbonaj homoj, kiuj prirabos vin.

Li ne rimarkis, kiam li endormiĝis. Ĝenerale oni povas fari nenion kontraŭ la endormiĝo. Tio venas subite, neatendite.

Ankaŭ Petro neatendite endormiĝis. Eble la monotona ratladoj de la randoj kaŭzis tiun ĉi staton.

Li havis strangan sonĝon. Antaŭ li estis alta monto. Li grimpis sur ĝin supren, sed neniam atingis la pinton. La monto estis tre alta kaj li ne vidis la supron.



Vane li iris, sed li ne povis atingi la supron. Petro ŝvitis kaj jam estis tre laca. Apenaŭ li povis movi.

Terura estis tiu ĉi sonĝo.

Dume la vagonaro kuris, kuregis. El tiu ĉi sonĝo li vekigis, nur kiam alvenis stacidomon.

Ili estis en granda, nekonata urbo. Li provis serĉi la nomon de la stacidomo. Tial li elklinis tra la fenestro. Sur la perono staradis nur kelke da homoj.

--Kie ni estas? – li demandis de preteriranto, sed tiu ne aŭdis lian demandon. Mute li foriris.

Baldaŭ Petro ekaŭdis la fajfadon de la fervojisto kaj la vagonaro ekiris.

Denove sekvis tedaj minutoj, kiam krom la monotona bruoj de la vagonaro li aŭdis nenion. Ne venis en la kupeon novaj pasaĝeroj. Li plu restis sola kun siaj pensoj.

Verdire oni estas sola, se ankaŭ en la kapo estas silento. Tio estas la plej terura. Tiu ĉi soleco murdas la homon. De ĝi liberiĝi estas neeble.

Petro ekpovis forpeli la silenton el sia kapo. Li nombris la forkurantajn arbojn preter la vagonaro. Post iom da tempo tio fariĝis teda, tial li ĉesis la nombradon kaj elpensis alian okupon.

Lia portebla komputilo ne estis kun li. Almenaŭ per ĝi li povus pasigi agrable la tempon.

Ankoraŭ li vojaĝis longe ĝis alvenos al la stacio.

Kion fari por ke la tempo pasu pli rapide? Li sentis, la silento enpenetras sian cerbon kaj kiel vermo maĉas ĝin.

Liberiĝi tuj de la silento kaj forĵeti ĝin tra la fenestro de la vagonaro.

Li ekstaris kaj faris kelke da gimnastikaj movoj en la kupeo.



La movo iom plivigligis lin kaj fartis pli bone. Forflugis el lia cerbo la silento. Denove pleniĝis ĝi de la bruoj.

Ekstere sur la koridoro iu forrapidis. Eble li estis la kondukto.

Estis posttagmezo. Belega dimanĉa posttagmezo. Ĝenerale li ŝatis tiajn tagojn. Tamen nun la soleco estis dolora.

Ankoraŭ tri horoj ĝis la alveno.

Kion fari?

Denove ekaperis la silento en lia cerbo. Kiel liberiĝi de ĝi?

En la tuta vagonaro estis nur kelke da pasaĝeroj. Dimanĉe oni ne ŝatas vojaĝi. Tiam ĉiu estas hejme kun la familio.

Certe ili jam tagmanĝis kaj nun ili sidas en la tagĉambro rigardante televidon aŭ ili dormetas. Trankvila estas la dimanĉa posttagmeza dormo.

Ankaŭ li kutimis dormeti, kiam li estis hejme. Li ekkuŝis sur la larĝan kanapon kaj lia patrino kovris lin per la lankovrilo aĉetita en foiro.

Ho, kiom agraba estis tiaj ripozoj!

Venontsemajne, kiam li estos hejme, li nepre dormetos post la tagmanĝo.

Sidante en la kupeo li sentis dormemon denove, sed nun ne volis dormi, ĉar li timis, dum la dormo lin atakos la silento.

Li timis de ĝi. La silento estis lia malamiko.

Subite haltis la vagonaro, kaj la tuta vagono tremiĝis. Ili staris sur kampo.

Kio okazis? – demandis en la aliaj kupeoj la pasaĝeroj – Ĉu akcidento? Eble.

Neniu sciis, kio okazis? Kie estas la kondukto? Oni devus demandi lin. Certe li povus informi ilin.

La kondukto estis nenie. Li malaperis.

Post kelkminuta atendado la vagonaro denove ekiris kaj kuregis, kiel la vento.

Silento malaperis. Vigliĝis la tuta vagono. La homoj iradis tien kaj reen. La infanoj kriegadis kaj malbonis.

La vagonaro preterkuris urbetojn kaj vilaĝojn. La tempo pasis. La silento neniam revenis. Li trankviliĝis, eĉ li fariĝis gaja.

Kiam li alvenis, li jam tute forgesiĝis pri la silento.

Kontente li elpaŝis el la vagonaro kaj ekiris hejmen.

-Apáti Kovács Béla-

Poezio

ATENDADO

Tago etendiĝas
kiel dormema kato,
mi atendas vin.

Arestita en ĉambro
kun espero ke vi alvenos,
mi atendas vin.

Tempo sensense paŝas,
kampoj atendas pluvegon,
kaj mi atendas vin.

Mateno maturiĝas en tago,
abeloj kolektas mielon;
dum mi atendas vin.

Senfina lazuro de ĉielo
salutas sunan lumon,
kaj mi atendas vin.

Enamiĝintoj promenadas,
kolomboj flugas super domoj,
dum mi atendas vin.

Vivaj montoj de viaj brustoj
ie promesante tremetas
dum mi atendas vin.

Junaj paroj vojaĝas mielmonaton
maljunuloj forgesadas junecon
ĝis kiam mi atendas vin.

Alvenadas fino de jaro,
ĉiuj atendas feston,
sed mi atendas vin.

Amo estas neordinara floro,
ĝi ne estimas regulojn,
ĉar mi, tamen, atendas vin.

Dimitrije JANIČIĆ
Beogrado
Serbio

Poezio

Mia filineto de Marjorie BOULTON

Ne estas mi unu el noblaj koroj
virinaj, tre pensantaj pri infanoj;
infanoj estas zorgoj kaj laboroj,
etaĵ, mallertaj kaj malpuraj manoj.

Mi ne kapablas plu por hejmaj amoj,
ne ŝatas ĝenojn kaj sendankan strebon
sed nun, malofte, sur dezertaj mamoj,
la korpo kreas sian ombran bebon.

Mi ne deziras vin, infano mia,
mi nun libera, iomete riĉa,
komforte vivas -- restu vi nescia
en la mallumo, eble pli feliĉa.

Kara, vi eĉ malamuz min, patrinon,
malindan min; kuŝiĝu en eterne!
Kvankam mi nun karesas halucinon,
ĉu vere estas vi mia koncerno?

Sur mia sino dum moment' siestu,
frukto de ombra amo, frukto honta;
foriru poste, filineto, restu
eterne en la mondo ne-estonta!

Etaj manplatoj, rozkoloraj plandoj --
ho, etulino! Sed okuloj brilas
jam larme -- superbolas per demandoj
pri l' vivo -- al la patro vi similas!



Por infanoj



Peĉjo helpas al avino

Peĉjo ofte feris ĉe sia avino. Li tre amis la maljunulinon, ĉar ŝi estis bonkora kaj ĉiam kuiris bonegan tagmanĝon al la knabeto.

Ĝenerale li vojaĝis al ŝi semajnofine kun siaj gepatroj kaj tie ili restis ĝis lundo.

La avino loĝis en ĝardena domo, kie estis multaj arboj kaj arbustoj.

La knabeto tre ŝatis ludi en la ĝardeno. La avino havis blankan, mildan hundon Hektor. Ĝi bonege gardis la domon kaj avinon.

Ankaŭ Hektor ĝojegis, kiam la gastoj alvenis kaj ĝi tuj kuris al Peĉjo.

--Ĉu vi atendis min Hektor? -- demandis li -- Vi tre mankis al ni.

La hundo feliĉe svingadis sian voston kaj kuris de avino al Peĉjo kaj reen. Certe ankaŭ por ĝi la alveno de la familio estis festo.

--Ĉiam Hektor ege atendas Vin nepeto mia -- diris la avino -- Kiam vi forvojaĝas, Hektor iras sub iun arbuston kaj tie ĝi malĝojas. Rigardu, kiom feliĉa ĝi estas ekvidante vin.

Peĉjo tuj ekludis kun la hundo. Dum la tuta posttagmezo ili kuradis en la ĝardeno. Ĝis vespero ili ambaŭ laciĝis. Apenaŭ ili povis movi. Ankaŭ Hektor kuŝiĝis antaŭ la pordon kaj tie ripozis.

Alitage dimanĉe Peĉjo frue vekigis. Li lavis kaj vestis sin. La avino jam atendis lin kun bongusta matenmanĝo.

--Peĉjo kara -- diris la avino -- vi devus helpi al mi.

La knabeton surprizis la peto, sed nun li ne deziris helpi, ĉar ekstere en la ĝardeno Hektor atendis lin.

--Avinjo -- li komencis amare --mi volonte helpus, sed nun mi havas alian programon. Bonvolu ne koleri!

--Ne estus granda laboro. Ja vi scias, mi estas maljuna kaj mia piedo ofte doloras min. Maturiĝis la pomo, kaj ni devus kolekti la falintajn pomojn. Ĝi estas nur dekminuta laboro. Ankaŭ mi estos en la ĝardeno. Ni kolektos la pomojn en ĉi tiun korbon. Ĝi ne estas laciga laboro. Mi tre ĝojus, se vi helpus al mi. Mi petas vin.

La avino parolis tiom kare, ke Peĉjo ne povis kontraŭdiri al ŝi. Post iom da hezitado la knabeto turnis sin al la avino kaj diris:

--Ĉu ankaŭ Hektor povos veni kun mi?

--Kial ne? -- ekridetis la avino -- Almenaŭ ankaŭ ĝi helpos al ni.

--Ĉu Hektor helpos al ni? Kiel ĝi povos? Ĝi estas nur hundo.

--Baldaŭ vi ekvidos. Ĝi ĝuos, se ĝi povos helpi al ni.

Peĉjo estis tre scivola, kiel povos Hektor helpi. Li apenaŭ atendis la pomokolektadon.

Ili ekiris al la ĝardeno. Elpaŝante el la domo la hundo jam staris antaŭ la pordo, kvazaŭ ĝi estus demandanta:

--Kien ni iras? Ĉu ankaŭ mi povos iri kun vi?

--Venu Hektor! -- diris avino -- Ni iras al la ĝardeno por kolekti pomojn. Peĉjo helpos al mi kaj ankaŭ vi.

En la ĝardeno estis tri grandaj pomarboj. Inter la branĉoj estis multe da ruĝaj pomoj, sed la nokta tempesto faligis multe, kiuj nun kuŝis sur la tero.

--Vere ili kuŝas sur la tero, sed ne kredu, ke ili estas malbonaj. Ni kolektas kaj manĝos ilin. Nu, ek al la laboro!

Ili komencis kolekti la pomojn de sur la tero. Hektor ĝoje kuregis de arbo al arbo kaj per sia nazo ĝi montris, kie kuŝas pomo, kiun la knabeto metis en la korbon.

--Avinjo -- ekkriis Peĉjo -- Hektor efektive povas helpi. Ĝi montras al mi, kie kuŝas en la herbaro la pomo.

--Mi diris al vi. Ĉu ne? Hektor estas tre helpema besto. Krome ĝi ĝuas helpi al ni.

--Mi neniam pensis, ke hundo povas helpi al mi por kolekti pomojn -- diris mire la knabeto.

La avino denove ekridetis:

--Ĝi ĉiam helpas al mi. Sen ĝi mi ne povus ekzisti. Hektor estas fidela besto.

La laboro rapide estis finita. La korbo tute pleniĝis de multaj, ruĝaj pomoj. Dume Peĉjo manĝis kelkajn. Ili estis bongustaj. Li volis doni pomon ankaŭ al Hektor, sed la avino avertis lin:

--Nepeto mia, hundoj ne ŝatas la fruktojn, dank al Dio, ĉar tiam ĝi manĝus ĉiom da pomoj en la ĝardeno kaj ne restus por ni. Prefere Hektor manĝas oston. Ĝi helpis al ni diligente, tial mi donos al ĝi bongustan hundonutraĵon, se ni enportos la pomojn.

Tiel okazis, ĉar kiam ili eniris la domon la avino donacis al ĝi grandegan medoloston.

Peĉjo estis tre kontenta, ĉar li helpis al sia avino.

-Onklo Adalberto-



Interesaj bildoj

